

LA ESPERANTO-DILEMO INTER HELPLINGVA VOKADO KAJ NATURIGHO.

La verko partas en: (1) Esperanto komunikata; (2) Esperanto komunikanta; (3) Esperanto komunikebla.

1. La 1a ĉapitro analizas la semantikan areon de la vorto tra korpuso da ĵurnalaj artikoloj precipe sur la datumbazo de "il Sole 240re". En tiuj artikoloj la vorto "esperanto" enas almenau unufojon. En la 2a ĉapitro la teksto panoramas la metaforo de la Orwell-a Newspeak kaj la opinioj de du italie famaj ĵurnalistoj, Indro Montanelli kaj Beppe Severgnini, kiuj diskutis ne tro inte la aferon.

La ĵurnalo-analizo komparas al la voĉoj "esperanto" de la plej gravaj enciklopedioj en la angla kaj en la itala. Profunda analizo dedichiitis al la difino "artificial language", "natura lingvo" kaj aliaj kutimaj klasifikad-sistemoj, kiel 'planlingvo' (kiu enigis, interalie, la novan europanton). La unua parto konkudatas per nova enciklopedia divino de "inventita lingvo" baze sur ne sufiche konata verko de la fama orientalista Alessandro Bausani (1974).

2. La 3a ĉapitro fokusas al la inventitaj lingvoj kiuj havas nun simpatianto-komunumon: la esperanta, la ida, la interlingua kaj la juna klingona, ludlingvo baze sur la startreka fikcia universo.

La lingvo-strukturo prezentatas pash' al pashe sur la vidpunktoj fonologia, morfologia, sintaksa kaj ech semantika kaj pragmatika.

La struktura specimeno kiu kauzis la esperanta superi siajn du plej gravajn konkurantojn dependas je la alta nivelo libere vortero-kunmeti - t.e. produktivo - kiu siaj parolantoj nekonscie emerghigis. Chiukaze, la kialoj de la esperanta-preminenco fontas ne de lingviko sed de historio kaj kulturo. La 4a longa ĉapitro dedichiitis al la Movado-historio, resumas kaj aktualigas la esploron de Forster (1982).

3. La 5a ĉapitro klarigas la originojn de la esperanta, kiuj estas strikte ligataj al la hebreeco de la lingvoinventinto, Zamenhof, kaj krome al la frua rusa cionisma movado. Krome interesindas la rilato inter esperantismo kaj du gravaj religioj, katolikismo kaj bahaismo, postislama moderna religio. La 6a parto analizas la lastajn tendencojn de la esperantistaro, kun speciala rigardo al la junulara subkulturo kaj lingvajho, kun siaj ĵhargonaj trajtoj. Tiu parto metodos antropologie, ĉar neniu pritema bibliografio ekzistas, kaj la parolata esperanta lingvo ghis nun estas preskau ne studata. La 7a kaj lasta ĉapitro analizas la shancojn ke la esperanta ighu federala lingov de EU kaj eksplikas la esperanto-dilemo. Sociolingvik-vidpunkte la esperanta ne malsimilas al la novhebrea (ivrita) antau la grundigo de Izraelo: ghi parolatas chiutage fare de unu milo da familio, sed ghi ne havas Sprachraum (lingveojn). Do ghi konsiderendas kiel preskau entute naturigita.

Sed kio okazus chu EU ighu sia lingvejon? La esperanta ighu Ausbausprache (tegmento-lingvo, Kloss 1968) de la europaj lingvoj, kiel nun en la slango de la junaj italaj esperanto-parolantoj, kiam ili parolas itale en nacia medio (nun la angla rolas tiel en junaj geitaloj). La Esperanto-Movado draste aliighus, ĉar la esperanta idento (bazita sur la onidiro "chui esperantisto egalrajtas") ighu ne plu vera: europanoj ighu "pli egalrajtaj ol la aliaj". Finfine, por akiri sian helplingvan vokadon la esperanta devas fini sian naturigho-procezo - t.e. akiri lingvejon - sed tion farante ghi endas faligi parton de sia idento. Chi tiu estas la Esperanto-dilemo, kaj eble la lingvo ne kapablas solvi tiun paradokson.